


julio/aŭgusto 2019

ESPERANTO-INFORMILO



AS

Rubrikoj ĉi-numere:

- Temo
- Programo en julio
- Programo en aŭgusto
- El la klubo
- Diversaĵoj

Kolofono

redaktoro: Anina Stecay (AS)
as.esperanto@web.de
korektintoj: W. Ullmann
R. Pflüger

Esperanto-Gesellschaft Frankfurt am Main

www.esperanto-frankfurt.de

Vorsitzender: Martin Schmitt

Bankverbindung:

Esperanto-Gesellschaft F.a.M
IBAN: DE75 5008 0000 0771 5717 01
BIC: DRESDEFFXXX
bei: Commerzbank Frankfurt

Jahresbeitrag

mit DEB-Beitrag: 96 €
Familienmitglied: 48 €
Nur ESF: 24 €
Familienmitglied: 12 €

Temo

Elkora pioniro malgraŭ koro plenrealisma – Stanislaw Schulhof

Kelkaj el vi memoros la nomon eble el nia lingva rondo en februaro ĉi-jara, kiam la temo estis „Esperanta poezio“. Tiam ni legis, komparis kaj pridiskutis du poemojn spegulante la sintenon de siaj verkintoj al Esperanto: „La Espero“ de L. L. Zamenhof (1891) kaj „Desperanto“ de Stanislav Schulhof (1911). Ne multaj el vi tiam konis Stanislav Schulhof; kelkaj eĉ surpriziĝis pri la ironia-amara etoso de lia poemo, kiu ŝajnis iom primokis antaŭulon „La Espero“ kaj esprimis la fortan dubon, ĉu eĉ post la fina venko la homaro vere troviĝos en paco.

Stanislav Schulhof mortis en aŭgusto 1919, kaj mi decidis kapti la okazon de lia 100-jara mortdatreveno por iom prezenti lin al vi.



© foto el Vikipedio

Schulhof naskiĝis en 1864 en orienta Bohemio; liaj gepatroj forlasis lin kaj la pli aĝan fraton kiam ili elmigris al Usono pro profesiaj kialoj, tirante la ses pli junajn gefilojn kun si. Helpe de sia frato Stanislav sukcesis fini studadon de medicino kaj poste specialiĝis pri dentkuracado. Li vivis kaj praktikis en Pardubice. Evidente li ŝatis lingvojn, ĉar krom la ĉeĥa lingvo li scipovis ankaŭ la francan kaj la ĉinan, kaj poste ankaŭ lernis la anglan kaj la turkan. Samtempulo de Zamenhof, Esperanton li eklernis tamen nur en 1904.

La ideo de Esperanto ravigis lin. Baldur Ragnarsson en sia artikolo por Juna Amiko karakterizas Schulhof kiel „sindonema esperantisto“, dediĉinta sin al la diskonigo kaj al la krea laboro en la lingvo. Fakte, kvankam Schulhof lernis Esperanton nur en 1904, li iĝis unu el tiuj veraj pioniroj de nia lingvo, kiuj senlace agadis sur multaj kampoj kaj atingis grandan kvanton da homoj: Schulhof prelegis, verkis artikolojn por esperantaj kaj ne-esperantaj gazetoj, instruis kaj krome prezidis la Esperanto-klubon en Pardubice. La plej elstara parto de lia agado estis tamen la literatura kampo.

Rimarkinde estas, ke kiam Schulhof esperantis-tiĝis, li jam estis verkisto de poemoj kaj teatraĵoj en la ĉeĥa. Li tradukis ĉeĥan poezion al Esperanto en *Bohemaj grenatoj* (aperigita nur en 1920 postmorte). En Esperanto li mem verkis tri poemarojn en relative tuja sinsekvo: *Per Espero al Despero* (1911), *Kion la Vivo alportis* (1911) kaj *Aŭtunaj floroj* (1912). Male al kelkaj poetoj el la tiama literaturperiodo, Schulhof povis ĉerpi el siaj poetaj spertoj en la denaska lingvo; tiel lia poezio jam dekomence estis pli matura kaj lingve pli rafinita ol ĉe aliaj niaj poetoj.

Kalocsay skribis pri li 1922 en *Literatura Mondo*:

„Tri volumetoj, en ili tridek poemoj.

*Konstanta evoluo kaj pliperfektigo
[...]“ kaj „Plenmano da versoj, granda
promeso portita en la fruan tombon...
kara malfeliĉa poeto, kara malsana
doktoro, kortuŝite mi ekkaresas vian
memoron.“*

El Schulhof-aj poemoj ofte gutas melankolio – por ne diri: pesimismo – montriĝanta ankaŭ en *Desperanto*. Kvankam entuziasma pri Esperanto mem, li en lingve kelkfoje avangarda maniero

esprimis, ke Esperanto sola ne helpas kontraŭ la malboneco de la homo.

Similan opinion li konatigas al ni en *Respondo* el la sama poemaro, kies lasta strofo jenas:

Kaj mi pensas ankaŭ, ke egale
kiel ĉe vi envi' ĉion pestas,
homon homo batas neniale;
nur en nia esperanta svarmo
nin kunigas speciala varmo
– ĉar ni ĝis nun tre malmultaj estas.

Konsiderante la historion kiu sekvis lian poezian sinesprimon (kun la Hispana Enlanda Milito 1936-1939 – pri kies komenca periodo el esperantista vidpunkto cetere aperis interesa parto el la taglibro de Eduardo Vivances en la 33a Beletra Almanako – kaj la nuntempaj bataloj en Sirio kaj en multaj aliaj partoj de la mondo), oni povas almenaŭ konstati, ke Schulhof pravus en la dubo, ĉu havi komunan lingvon kondukos al paco inter homoj. La plej kruela pravigo de tio estas, ke liaj filo kaj edzino pro la juda deveno estis mortigitaj en koncentrejoj en 1942 respektive 1945 – kaj kiom da germanaj judoj estis mortigitaj de samlingvanoj?

Bedaŭrinde en 1912 lia poeziado haltis; mi supozas, ke lian verkadon interrompis la Unua Mondmilito, kaj ke li pro tio ne publikigis pliajn verkojn. Baldaŭ post la Unua Mondmilito li infektiĝis je meningito kaj mortis en 1919 nur 54-jara. Lia esperanta agado do nur ampleksas 15 jarojn, inter kiuj la Unua Mondmilito certe frostigis la ageblon dum pluraj jaroj. Tamen Schulhof estas konatinda antaŭulo de ni kaj postlasas al ni legendan verkaron, el kiu mi la verŝajne plej konatan poemon volas ĉi tie prezenti: En *Kanto de l' Sklavo* Schulhof esprimas sian senton kontraŭ nia lingvo, korinklino tiom forta, ke ĝi iĝas eĉ kateniĝo.

Kanto de l' sklavo

Nun mi klare vidas, ke jam sorto mia
estas alligita al vi per kateno,
ke mi nun jam devos ĉiam kun vi iri,
ke mi certe ne sukcesos jam akiri
liberecon, mia nova suvereno!

Multefoje mi forĵetis mian plumon,
eĉ emblemon vian: stelon kvinradian,
en la kor' la fajron mi estingi penis,
sed vi senkompate ĉiam min ekprenis,
kaj min pluen, pluen trenis: sklavon vian.

Al vi apartenas do nun vivo mia,
ĉio, kion jaroj lasis en la koro
vin mi sekvas nune, kiel somnambulo,
tute kontraŭvole, tute sen postulo,
kaj mi jam ne revas eĉ pri laŭr' kaj gloro.

Kie vi ja prenis tiun sorĉan forton?
Vi tra landoj marŝas sen la sang' sur glavo
sen kanonoj, nur kun via verda stelo,
kaj vin malgraŭ tio sekvas sen ribelo
ĉiam novaj, blinde obeemaj sklavo.

Pli kruelan, ol la famaj uzurpantoj
vi alportis al ni en la mondon moron:
ili piedbatis homajn liberecojn,
de la landoj ŝiris partojn, limojn, pecojn,
sed vi ŝiras el la brustoj nian koron.

(AS)

Programo en julio

Klub-Abend

Klubvespero

Saalbau Bockenheim
Schwälmer Str. 28
Frankfurt am Main

Donnerstag, d. 4. Juli 19

ĵaŭdon, la 4-an de julio '19

18:30 h

Sprachrunde: Tierische Sprichwörter & Ausdrücke
(W. Ullmann)

Lingva Rondo: Bestaj proverboj & esprimoj (W.
Ullmann)

19:30 h

Vortrag: **Einführung in die finnische Sprache** (H.
Horeth)

Prelego: **Enkonduko en la finnan lingvon** (H.
Horeth)



uzata: foto de Janne Karaste en Wikipedia,
CC BY-SA 3.0

Hartmut möchte uns eine kurze Einführung in die finnische Sprache geben, hauptsächlich in die Aussprache, in die hauptsächlichlichen Formen der Verbklassen, die Kasusendungen des Substantivs, in das System der Lautgesetze, in die Unterschiede zwischen der Umgangssprache (sog. puhekieli) und Schriftsprache (sog. kirjakieli). Außerdem handelt sein Vortrag von den Wortfeldern, die uns ermöglichen 1. nach dem Weg zu fragen 2. einen Arzt aufzusuchen. Zusätzlich präsentiert er Worte oder Sätze, die sich auf öffentlichen Hinweisschildern finden.

Hartmut intencas doni al ni koncizan enkondukon en la finnan lingvon, ĉefe en la prononcadon, en la ĉefajn formojn de la verboklasoj, en kazajn finaĵojn de la substantivo, en la sistemo de la sonleĝoj, en la diferencojn inter la komuna lingvo (t.n. puhekieli) kaj la literatura lingvo (t.n. kirjakieli). Krome lia prelego temos pri la leksiko kio ebligas al ni 1. demandi la vojon kaj 2. konsulti kuraciston. Aldone li prezentos vortojn aŭ frazojn, kiuj troviĝas sur publikaj indikiloj.

Donnerstag, d. 18. Juli 2019

ĵaŭdon, la 18-an de julio 2019

18:30 h

Plauderstunde

babila rondo

Programo en aŭgusto

Klub-Abend

Klubvespero

Donnerstag, d. 1. Aug. 19

ĵaŭdon, la 1-an de aŭg. 19

fällt aus wegen Saalbau-Ferien!!!

ne okazos pro fermiĝo de Saalbau!!!

Donnerstag, d. 15. Aug. 19

ĵaŭdon, la 15-an de aŭg. 19

Sprachrunde: Sprachspiele (R. Pflüger)

18:30 h

Lingva Rondo: Lingvaj ludoj (R. Pflüger)

Vortrag: **Bericht vom Deutschen Esperanto-Kongress** (W. Ullmann)

19:30 h

Prelego: **Raporto pri la Germana Esperanto-Kongreso** (W. Ullmann)



La urbodomo de Neumünster,
foto de U. Barghaan en Wikipedia
CC BY-SA 3.0

Der Deutsche Esperanto-Kongress fand dieses Jahr in Neumünster, Schleswig-Holstein, statt. Nachdem die UN 2019 ja zum Jahr der indigenen Sprachen erklärt haben, sind Sprachengerechtigkeit und Sprachenrechte auch Thema des diesjährigen Kongresses. Herr Ullmann wird uns erzählen, was wir Nicht-Anwesenden vielleicht verpasst haben.

La Germana Esperanto-Kongreso ĉi-jare okazis en Neumünster, Ŝlesvigo-Holstinio. La UN ja deklaris 2019 la Jaron de indiĝenaj lingvoj; pro tio lingva justeco kaj lingvaj homaj rajtoj formas la kadran temon ĉi-jaran. S-ro Ullmann prezentos al ni ne-ĉeestintoj, kion ni eble maltrafis.



© foto de Philipp T de Pixabay

Samstag, 10. August 2019

Für das Sommerfest mussten wir kurzfristig umdisponieren; Martin Schmitt war einverstanden, uns noch mal zu sich einzuladen.

Die Adresse: Gießener Str. 18,
35415 Pohlheim

Bitte meldet Euch bei ihm an, damit er die Stühle und Getränke planen kann.
Das Fest beginnt um 13:00 Uhr. Wie immer bringt jeder sein Grillgut bitte selbst mit; außerdem wäre es schön, wenn jeder einen Salat oder Nachtisch oder eine andere Spezialität zum gemeinsamen Essen beitragen würde.
Für diejenigen, die mit dem ÖPNV kommen, befindet sich die Bushaltestelle "Pohlheim, Zur Brücke" mit Anschluss von und nach Gießen direkt vor der Tür.

sabaton, la 10-an de aŭg. 2019

Por nia ĉi-jara somera festo ni devis ŝanĝi niajn planojn; Martin Schmitt konsentis denove gastigi nin en sia ĝardeno.

La adreso: Gießener Str. 18,
35415 Pohlheim

Bv. indiki vian ĉeeston al Martin, por ke li povu plani la sidlokojn kaj trinkaĵojn.
La festo komenciĝos je la 13:00 horo. Kiel kutime ĉiu mem kunportu siajn rostaĵojn; krome estas bone, se ĉiu kontribuas per salato, deserto aŭ alia specialaĵo al la komuna manĝaĵo.
Por tiuj, kiuj venas per publikaj transportiloj, la bushaltejo "Pohlheim, Zur Brücke" kun konekto de kaj al Gießen Bahnhof troviĝas rekte antaŭ la pordo.

El la klubo**Naskiĝtagon havos en julio:**

Robert Bittner 06.07.
Katarina Eckstädt 09.07.

kaj en aŭgusto:

Klaus Rumrich 01.08.
Anina Stecay 29.08.

Ni kore gratulas!

Klubanoj legas por UNESKO-kuriero

Nia kluba renkontiĝo dum la tria ĵaŭdo de ĉiu monato ja kutime servas kiel tempo por sen-tema babilado; ĝi ofte estas vizitata malpli kvante ol la unua ĵaŭdo kaj la renkontiĝo en Stattcafé.

Por la tria ĵaŭdo de majo tamen nia membro Frank Lappe havis bonan ideon kiel utiligi la tempon: Li petis registri nian voĉlegadon de artikolo de UNESKO-kuriero.

La UNESKO-kuriero estas la oficiala revuo de UNESKO (Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo), aperinta inter 1948 kaj 2012 kun kvar eldonoj jare.

Dum multaj jaroj ĝi estis printita en la ses oficialaj lingvoj de UNESKO: la angla, la araba, la ĉina, la franca, la hispana kaj la rusa.

Post renovigo kaj refinancado de la eldonado en 2017 la organizaĵo rajtigis Esperanton kiel kroman lingvon. Tio por nia lingvo estas granda atingo, ĉar tiel ĝi denove prezentiĝas al la mondo per oficiale agnoskita internacia komunikilo.

Inter la internacia teamo, kiu kunlaboras por esperantigi la artikolojn el la aliaj lingvoj, troviĝas ankaŭ nia membro Frank. Li estas unu el 45 tradukantoj kaj provlegantoj, kiuj necesas por ĉiun jarkvaronon certigi la altkvalitan aperon de la kuriero.

Por disponigi la enhavon ankaŭ al ekzemple homoj kun malbona vidkapablo aŭ al analfabetoj, la celo estas, ke ĉiuj artikoloj de la kuriero aperu ankaŭ kiel sonregistraĵoj aŭskulteblaj MP3-formate sur la hejmpaĝo de la kuriero.



Titolpaĝo de kajero 2-2018, © ĉe UNESKO

En majo do Frank estis elektinta el kuriero 2-2018 artikolon titolantan: „Vortaro por la homepoko“. Ĝi estis leksikoneca artikolo kun klarigoj rilate diversajn kapvortojn de tiu teorio kiel „granda malsamiĝo“ aŭ „sesa formorto“.

Pro la interna disdivido de la teksto estis facile disdividi ĝiajn pecetojn inter la kvin klubanoj.

Frank registris nin per surkapa mikrofono-aŭskultilo. Estis tre interesa sperto. Voĉlegado estas sufiĉe defia – unue pro la ĝenerala postulo, ke oni legu klare kaj malrapide kaj tamen sufiĉe engaĝige.



Hilde Stecay dum voĉlegado kun Frank Lappe registranta; Walter Ullman kaj Georg Hennemann sin preparantaj

© AS

Sed en artikoloj tiaj aldoniĝas la problemoj, ke ankaŭ aperas fremdlingvaj personaj nomoj aŭ lokoj aŭ organizaĵoj, kaj oni kelkfoje devas eĉ interrete serĉi por trovi ties ĝustan elparolon.

Tamen oni ne zorgu: Oni povas laŭtlegi la tekston plurfoje, kaj poste tranĉi kaj munti la plej bonajn partojn el la diversaj versioj, do ne tro gravas, se oni foje mislegas ion. Teknike oni bezonas simplan mikrofonon kaj senpagan programon por registrado kaj muntado.

Se vi interesiĝas pri la kunlaboro pri UNESKO-kuriero, aŭ se vi simple ŝatas legi aŭ utiligi la tekstojn ekzemple por instruista laboro, vi trovas ĉion sub: kuriero.esperas.info

(AS)

La libroservo informas nin

Ist Esperanto noch aktuell?

Dr. Max Hans-Jürgen Mattusch aus Düsseldorf hat einen umfassenden "Essay über ein kontrovers diskutiertes sprachliches Projekt", wie er sein gerade veröffentlichtes Buch im Untertitel nennt, verfaßt.

Die künstlich geschaffene internationale Sprache Esperanto ist eines der kontroversesten Projekte auf sprachlichem Gebiet und wird trotz ihrer über 130jährigen Existenz noch immer heftig diskutiert. Selbst wenn ein großer Teil der Ideen ihres Initiators Zamenhof, wie eine Welt ohne Kriege oder eine Universalreligion, nicht verwirklicht wurde, hat er doch die Grundlage für eine leicht erlernbare neutrale Sprache geschaffen, zu der sich, trotz Repressalien aller Art, eine weltweite Sprachgemeinschaft bekennt. Esperanto ist als Zweitsprache (neben der Muttersprache) nicht nur eine Sprache mit einer weltumfassenden Dolmetscherfunktion, sondern zugleich eine solche mit einer weltverbindenden Friedensmission.

Esperanto lebt und erinnert daran, daß in einer globalisierten Welt, in der zur Zeit das Englische dominiert, eine demokratische und freiheitliche Verständigung von Mensch zu Mensch keine Utopie bleiben muß,



Titelpaĝo de la libro, prenita el la reto

denn es bietet jedem die Chance zur gleichberechtigten Teilnahme an einer weltweiten Kommunikation, da es niemandes Muttersprache ist.

Das Buch hat 159 Seiten, ein ausführliches Literaturverzeichnis und im Anhang eine tabellarische Übersicht der bisherigen Esperanto-Weltkongresse sowie eine Zeittafel, in der die Entwicklung des Esperanto sowie wichtige gesellschaftliche Ereignisse dargestellt sind. Es ist erhältlich beim Esperanto-Buchversand: www.esperanto-buecher.de

(Dr. W. Schwanzer)

Peto de la redaktoro

Nia El havas longan kaj bonan historion. Mi klopodas prezenti nun kaj ĝeneralajn informojn, kaj aktualajn okazintaĵojn, kaj ankaŭ iom amuzajn aferojn. Mi ĝojas pri rimarkoj kaj proponoj pri plibonigoj. Kaj mi petas vin, se vi havas ion por rakonti, se vi aŭdis bonan ŝercon, se vi havas

bonajn fotojn, se vi kapablas trafte karikaturi ktp., sendu al mi (as.esperanto@web.de) kontribuaĵojn, por fari El ankoraŭ pli interesa, pli multifaceta, pli bunta!

Diversaĵoj

Logik-enigmo

Kvar geedzoj ĉiujare vizitas la saman esperantan kunvenon. Al ĉiuj ĝuste plaĉas ‘sia’ kongreso. Ĉu vi povas eltrovi, kiuj veturas kien kaj ekde kiam? Kaj per kiu veturilo?

(Se vi bezonas ĝeneralajn indikojn kiel solvi tiaspecajn enigmojn, bv. rigardi en EI de oktobro 2018.)

nomo virino	nomo viro	devenlando	kongreso	ekde kiam	per

1. Astrid kaj ŝia edzo ĉiam prenas la aviadilon.
2. Diana el Albanio kun sia edzo – kiu ne nomiĝas Martin – ne veturas al sia kongreso de precize 11 jaroj.
3. Marie ĉiam vizitas Literaturajn Konfrontojn.
4. La paro, kiu iras al SEK, de 8 jaroj vojaĝas al la kunveno, sed ne per aŭtomobilo.
5. Björn kaj lia edzino ĉiam vojaĝas trajne.
6. Kristin kaj ŝia edzo George ne venas el Nederlando.
7. Tiuj, kiuj veturas per pramo al UK, ne estas Kristin kaj ŝia edzo.
8. La du svedoj, kiuj ne iras al Vintra Esperanto-Studado, vizitas la saman kongreson de 4 jaroj.

	Björn	George	Kenan	Martin	aviadilo	aŭtomobilo	pramo	trajno	3 jaroj	4 jaroj	8 jaroj	11 jaroj	Universala Kongreso UK	Vintra Esperanto-Studado VES	Literaturaj Konfrontoj LIKo	Sud-eŭropa Kongreso SEK	Albanio	Nederlando	Rumanio	Svedio	
Astrid																					
Diana																					
Kristin																					
Marie																					
Albanio																					
Nederlando																					
Rumanio																					
Svedio																					
Universala Kongreso UK																					
Vintra Esperanto-Studado VES																					
Literaturaj Konfrontoj LIKo																					
Sud-eŭropa Kongreso SEK																					
3 jaroj																					
4 jaroj																					
8 jaroj																					
11 jaroj																					
aviadilo																					
aŭtomobilo																					
pramo																					
trajno																					

Kiu sendos al mi kiel unua la ĝustan solvon estas menciota en la venonta EI!

Solvo de la junia enigmo

Jenaj Zamenhofaj proverboj troveblis sur la ŝakbreto:

Malnova afero en nova livero.
Longe ĉerpas la kruĉo, ĝis ĝi fine rompiĝas.
La manĝota fiŝo estas ankoraŭ en la rivero.
Kiel oni sternas, tiel oni dormas.
Kie fumo leviĝas, tie fajro troviĝas.
Kapo pekas, piedoj suferas.

– Alter Wein in neuen Schläuchen.
– Der Krug geht so lange zum Brunnen, bis er bricht.
– Über ungelegte Eier lohnt es sich nicht zu sprechen.
– Wie man sich bettet, so liegt man.
– Wo Rauch ist, ist auch Feuer.
– Was man nicht im Kopf hat, muss man in den Beinen haben.

Vorto de la monato

Ĉi-foje mi trovis la vorton „**mocio**“.
Laŭ NPIV ĝi signifas: Oficiala propono dum kunveno por estigi diskuton por nova leĝo, reglamento ktp.
En la germana ĝi estas „Antrag“.

Ŝerco

“Sinjoro doktoro, mi miras, ke mia edzino naskis ruĝharan infanon, ĉar nek ŝi nek mi havis ruĝharajn gepatrojn.”
“Ĉu vi havas rilatojn kun via edzino ĉiutage?”
“Ne.”
“Ĉiusemajne?”
“Ne.”
“Ĉiumonate?”
“Ne.”
“Ĉiujare?”
“Jes, proksimume.”
„Do ne mirindas, ke la haroj de la infano estas rustkoloraj.”

(el: Kruko kaj Baniko el Bervalo, de Louis Beaucaire)